

V-19479/35

(1966)

Bulgara ESPERANTISTO



1966

6

UNUIGITA PRODUKTADA ENTREPRENEJO „UNUA DE MAJO“ POR KOTONTEKSAĴOJ — urbo VARNA

PRODUKTAS

por la eksterlanda kaj enlanda merkatoj

altkvalitajn kotonteksaĵojn kaj ŝpinaĵojn:

Oksford-ŝtofo kvadratumita — 70 kaj 80 cm

Oksford-ŝtofo striita — 70 cm

Oksford-ŝtofo unukolora — 80 cm

Roboŝtofo „Marusja“ — 70 cm

Blankigita tolo „Vitoŝa“ — 80 cm

Blankigita tolo „Balkan“ — 80 cm

Kalikoto speciala — 80 cm

Tiko — 70 cm

Nankeno kun diversaj larĝoj k. a.

Kovrilpaĝo: Multetaĝa moderna hotelo en la restadejo „Slânêv Brjag“ („Suna Bordo“)
apud Nesebr ĉe la Nigra Maro

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv.,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Per-
metit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru. Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52-54-
kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10—a

**TAGO DE LA HEROOJ PEREINTAJ POR LA LIBERO**

Ĉiujare je la dua de junio nia popolo celebras la datrevenon de la pereco de nia granda poeto, revolucia demokrato kaj patrioto, Hristo Botev, falinta en batalo inter du neegalfortaj kontraŭuloj — batalo kontraŭ la otomanaj sklavigantoj. Samtempe ĝi klinas batalstandardojn memore al ĉiuj siaj filoj kaj filinoj pereintaj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj la kapitalismo. Kaj ne hazarde, nia popolo, liberiĝinta el la katenoj de l' faŝismo elektis la duan de junio kiel tagon de tiu omaĝo.

La celebrado de la tago de l' pereco de Botev en la kondiĉoj de la konstruado de l' socialismo havas gravan signifon ankaŭ pro tio, ke ĉe la novaj historiaj kondiĉoj saturitaj per nova enhavo la revoj de Botev efektiviĝas. Antaŭ pli ol naŭdek jaroj, kiam nia popolo ĝemis sub duobla jugo — politika kaj spirita, Botev vidis profunde en la estontecon.

„Nia popolo — skribis Botev — havas sian specifan vivon, specifan karakteron, specifan fizionomion, kiu reliefigas ĝin kiel popolon — donu al ĝi rajton disvolviĝi laŭ ĝiaj popolaj trajtoj kaj vi vidos kian parton de la socia vivo ĝi disvolvos; donu al ĝi, almenaŭ ne malhelpu ĝin liberiĝi el tiu barbara gento, kun kiu ĝi havas nenion komunan, kaj vi vidos kiel ĝi ordigos sian vivon. . . Eliro el tiu ĉi peza situacio ne estas novaj katenoj, . . . sed la popola revolucio“ . . .

Botev revis pri la libereco de sia popolo, kaj je la Naŭa de Septembro 1944 ĝi estis konkerita por ĉiam. Sed por tiu libereco nia popolo sub la gvidado de la Bulgara Komunista Partio kaj sub la standardo de la Patrolanda Fronto devis konduki pezan batalon kontraŭ la monarko-faŝisma tiranio. En tiu batalo pereis miloj da konataj kaj sennomaj batalantoj, inter ili ankaŭ multaj geesperantistoj, kiel Vela Piskova, Dilo Jotov, Nikola Šopov, Angel Petkov — Anĝelo, Stojan Edrev, la poeto Hristo Kârpaĉev, D-ro Vârban Genĉev, Vela Peeva, Stoju Kalpazanov, Dimitr Kaljaŝki, Nikola Miŝev — Kamarado, Teofil Angelov, Penka Mihajlova, Todor Sofroniev kaj multaj aliaj.

Kun Boteva kredo ili ĉiuj heroe oferis sian vivon por la libereco kaj la feliĉo de sia popolo kaj por ĝia brila estonteco!

A. Lakov

MODO DE LA VERBO

(originala rakonto)

de Petr D. Edrev

Kaŭzo de ĉio okazinta estis la gramatiko, aŭ pli ĝuste mi, kiu scias la gramatikon, aŭ plej ĝustadire, se vi volas — la virinaj larmoj.

Ekde frua infaneco mi malŝatas la ploremlulojn kaj ankaŭ Fanjon, la filinon de mia dommastro, kiun mi tute ne povis toleri. Ŝi estante jam dektrijara junulino, imagu, ploregis pro tute malgravaj kaŭzoj. Se ekzemple, en la klasa gvidkomitato ŝi ne estis elektita — sekvis larmoj, kiam la knaboj nomis ŝin „Flavbekulino“ aŭ ion similan — denove larmoj. Kaj kiam ŝi ricevis pli malaltan poenton aŭ riproĉmarkon en sia lernanta notlibreto, venis la kulmino de ŝiaj ploroj!

Ĉu vi iam provis solvi matematikajn problemojn, aŭskultante ploradon? Kaj precipe kiam nenian rezulton vi havas, kaj kiam vi scias, ke morgaŭ tiu kaniĉo, la matematikisto, sen kia ajn indulgo sendos vin al la diabloj!

En tia tago mi simple freneziĝis. Mi malbenis la matematikon kaj mi fuĝis el la loĝejo por savi min almenaŭ de tiu plormuĝado.

Aŭdinte la frapbruon de la malfermita pordo, eliris el sia ĉambro ankaŭ Fanjo. Ŝia tuta vizaĝo estis malseka. Tiom multe da abomenaj larmoj, ke ili kvazaŭ estus sulkigintaj per brunaj kanaletoj ŝian ne tiom belan vizaĝon.

— Ĉu vi scias. . . kio estas modo de la verbo?

— Modo de la verbo! — grincigis mi la dentojn. — Jen nun pri modo de la verbo!

— Mi forestis el la lernejo. Nun miaj samklasanoj. . . ne povas klarigi ĝin al mi. . . Neniu povaaa. . .

— Silentu vi, al la diabloj! Mutiĝu!. . . Kajeron donu, mi klarigos ĝin al vi.

Kaj jen mi devis ludi la rolon de instruisto. La viro estas preta ĉion fari, nur por savi sin de virinaj larmoj.

Ĉe la tablo jam sidas la ploremlulo kaj memstare analizas la frazon „Traktoro plugas la teron“!

— „Traktoro“ estas subjekto, ĉu ne, „plugas“ — predikato, „la teron“ — rekta komplemento. . . . Jes. Sed kie sin trovas la modo?

— Kiam la ago de la verbo eliras el la subjekto — aŭtoritate emfazas mi — kaj falas sur la komplementon tiam la ago estas ak-ti-va modo. Ĉu vi komprenas? La ago eliras el la subjekto „traktoro“ kaj direktas sin al la komplemento „la teron“.

— Ĉu. . . la afero estas tiom simpla?

— Jes. Se vi ĝin komprenas, vi povas doni alian ekzemplon.

Ŝi eksilentis dum momento, ekrigardis min kaj, unuafoje sen plorsingultoj, ŝi diris:

— Vi, instruisto mia, tre bone klarigas al mi.

Mi, la serioza, kompatinda gimnaziano emociiĝis.

— Ne babilu, ekzemplon donu!

— Ĉu tio ne estas ekzemplo? La ago eliras el la subjekto „instruisto mia“ kaj direktas sin al mi.

Ne, mi tute ne povis kontraŭdiri pri ĉi tiu trafa ekzemplo. Komprenkapabla estas la diablino!

— Atentu nun pri la pasiva modo. Pasiva modo estas kiam la ago eliras el la subjekto kaj falas sur ĝin mem. Ekzemple. . . ekzemple: „Fanjo sin banas, sin vestas, sin bone distras.“ Sufiĉe! Se al vi ĉio estas klara, jam vi sola povas prepari vian hejman skribotaskon.

— Ĉu tio estas ĉio pri la modo de la verbo?

— Jes, ĉio.

— Kiom facila ĝi estas por kompreno, panjo mia!

Ŝia vizaĝo ekradiis. En ŝiaj okuloj aperis du novaj larmetoj, kiuj malrapide rulfalis tra la neforviŝitaj sulketoj. Du novaj larmetoj!

Unuafoje en mia vivo mi havis nion kontraŭan al la virinaj larmoj.

Unuafoje en mi io ekstrems. Aperis sento nova, nekonata ĝis tiu momento. Kara, mirinde, pleniganta la koron sento. . . de viro al la virino.

Pasis multaj jaroj post tiu tago.

Nun mi estas homo multspertinta, klera. Kaj kvankam ĝis nun mi ne estas konvinkita pri la utilo de la gramatiko, bonege mi scias, kia terura forto en la mondo povas esti la virinaj larmoj.

(Premiita en la Literatura konkurso)

PACA ĈIELO — FELIĈA INFANARO

En nia lando, lando de la rozoj, ni ĉiuj laboras kaj konstruas por la bono kaj feliĉo de la infanoj, kiuj estas nia zorgo, ĝojo kaj espero.

„Por la infanoj estas necese doni ĉion“ — parolis iam nia amata kaj neforgesebla gvidanto kaj instruanto Georgi Dimitrov.



Por niaj infanoj estas konstruitaj 1100 infanvartejoj kun pli ol 45,000 litoj, 800 el ili estas en la vilaĝoj.

7,648 infanĝardenoj helpas al la bulgaraj patrinoj okupitaj en produktada laboro.

En Bulgario la instruado por ĉiuj infanoj estas tute senpaga.

Dum la somero la bulgaraj infanoj ripozas en 1,430 someraj restadejoj. Multaj infanoj el eksterlando ripozas kune kun la bulgaraj infanoj en la internacia somerripozejo ĉe la Nigra Maro kaj en belaj montodomoj.

La infana Dimitrova Organizaĵo „Septemvrijče“ kaj la Junpioniraj Domoj helpas la infanojn en iliaj studoj kaj bona edukado pere de plej diversaj rondetoj kaj artismaj ensembloj, kiel la Kantoro „Bodra Smjana“, la infana Simfonia orkestro, kiuj famiĝis en multaj landoj de Eŭropo.

Ĉe la Junpioniraj Domoj estas organizitaj kluboj de la amikeco inter la infanoj de plej diversaj landoj en la tuta mondo. La klubanoj regule korespondas kun siaj eksterlandaj amikoj.

La bulgaraj junpioniroj esperantistoj en Ruse estas en amikaj rilatoj kun la infanoj en urbo Szolnok, Hungario. Dum la kuranta jaro ili akceptis alvokon por paco kaj amikeco inter la infanoj de la tuta mondo.

La bulgaraj esperantistoj kredas ke se la ĉielo estas paca, la infanoj estos feliĉaj.

Evgenia Prof. Staikova

ĈE LA DISIĜO EN JARO 1868

de Ĥristo Botev



Ne ploru, panjo, ne plendu,
ke mi fariĝis hajduto,
hajduto kaj ribelulo
kaj lasis vin malfeliĉa
pri id' unua veadi!
Malbenu, panjo, malbenu
la turkan nigran ekzilon,
kiu nin junajn forpelis
en tiun tedan fremdlandon
por vagi kaj suferadi
senhejmaj, kaj en mizero!
Mi scias, panjo, vi ploras,
ke eble juna mi falos
ah, morgaŭ post mi trapasos
kvietan blankan Danubon!
Sed diru kion mi faru,
se vi, ho panjo, min naskis
kun koro vira, bravula,
kaj, panjo, kor' ne toleras
rigardi turkon turmenti
la karan hejmon gepatran,
la hejmon kie mi kreskis,
unuan lakton eksuĉis
kaj kie belamatino
levis la nigrajn okulojn
kaj kun balzama rideto
ilin en koron enpikis
lok' kie patroj kaj fratoj
pri mi suferas kaj velkas.
Ho, panjo — panjo bravula,
pardonu min kaj — adiaŭ!
Pafil' jam pendas sutŝultre
urĝigas min vok' popola
kontraŭ tirano malpia.
Por ĉio kara, amata,

por vi, por patro, por fratoj
mi luktos kontraŭ la turkoj
kaj. . . kion sabro destinos
kaj honor', panjo, bravula!
Kaj kiam kuglon fajfantan
super vilaĝo vi aŭdos
kaj tuj junuloj elsaltos,
eliru, panjo — demandu
kie fil' via postrestis?
Se oni dirus, ke mi jam
falas per kuglo trafita,
eĉ tiam, panjo, ne ploru,
nek al la homoj vi kredu,
pri mi se ili parolos:
„Do, sentaŭgulo li estis!“
Sed hejmen iru, patrino,
elkore ĉion rakontu
al miaj fratoj junaĝaj,
ke ili sci, memoru,
ke fraton havis samsangan
sed frato falis, pereis,
ĉar plu ne povis toleri
al turkoj ĉiam subiĝi
mizeron fratan rigardi!
Diru, ke ili memoru,
memoru kaj min serĉadu:
la blankan karnon sur rokoj,
sur altaj rokoj ĉe l'agloj,
la sangon nigran — en tero,
en la ter' nigra, ho panjo!
Kaj ili trovu la sabron,
la sabron kaj la pafilon,
kaj, renkontinte tiranojn,
per kuglo ilin salutu,
per sabro ilin karesu. . .
Se vi, ho panjo, ne povos
pro ĉagren' fari eĉ tion,
eliru kiam kunvenos
l' junulinoj por rondanco,
kaj venos miaj kunuloj
kaj l' amatino malĝoja,
eliru, panjo, aŭskultu
kun miaj fratoj junaĝaj
pri mi la kanton bravulan
kial kaj kiel mi falis,
kaj kiajn vortojn mi diris
antaŭ mort' al la taĉmento. . .
Vi triste, panjo, rigardos
al tiu gaja rondanco
kaj dum vi trafos l' okulojn
de mia kor-amatino,
kune ekĝemos profunde
du koroj, por mi karegaj —
kor' ŝia, panjo, kaj via!
Kaj du larm-perloj surfalos
maljunan bruston kaj junan. . .
Sed tion fratoj ekvidos
kaj kiam ili viriĝos,

kiel mi, panjo fariĝos —
 forte malamos kaj amos. . .
 Se mi, ho panjo malĝoja,
 revenos viva kaj sana
 kun la standardo en mano,
 kaj sub standardo — bravuloj,
 sveltaj — en vestoj soldataj,
 kun leonsignoj surfrunte
 kaj kun pafiloj surŝultre,
 ĉe lumbo sabroj, serpentoj,
 ho tiam, panjo bravula,
 ho, kara koramantino,
 deŝiru florojn ĝardenajn,
 hederojn kaj geraniojn,
 plektu florkronojn, bukedojn,
 ornamu kapojn, pafilojn!
 Tiam kun krono el floroj
 al mi vi, panjo, alvenu,
 alvenu, min ĉirkaŭprenu,
 sur bela frunto min kisu

bela, kun skrib' testamenta:
 „Liberon aŭ morton bravulan!“
 Mi amatinon brakumos
 per sanga brako traŝultre —
 ŝi aŭdu koron bravulan,
 batantan koron ludantan;
 mi kise ploron ĉesigos,
 mi buŝe larmojn eltrinkos. . .
 Kaj tiam. . . panjo, adiaŭ!
 Min, karulin', ne forgesu!
 Taĉment' ekiras, foriras,
 laŭ voj' terura, sed glora:
 mi eble juna pereos. .
 Sed rekompenco sufiĉas,
 se diros iam popolo:
 Li, povra, mortis por justo,
 por justo kaj por libero. . .

Tradukis el la bulgara originalo:
Ivan Dobrev

EN PRIMOŝTEN

Dum la somero de 1965 mi pasigis kelkan tempon en la internacia Esperanto-Kampadejo en Primoŝten, Jugoslavio.

Inter la aliaj entreprenoj, kiujn la geesperantistoj efektivigas tie estas jena: sur la placo, antaŭ la restoracio, estas preparitaj 17 bedoj. En 14 de ili geesperantistoj el diversaj landoj de la mondo portis kaj metis teron de siaj patrolandoj, kaj tiamaniere ĉiu bedo estas nomita je la nomo de tiu lando. Ĝis nun geesperantistoj el jenaj landoj „okupis“ sian teritorion en Primoŝten: Japanio, Aŭstrio, Francio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, USSR, Italio, Germanio, Hungario, Nederlando, Novzelando, Belgio, Svislando, Usono. Mi ankaŭ sukcesis meti bulgaran teron en unu bedon, kiu nun jam estas nomita „Bulgario“. Unu nia najbaro estas Usono, kaj la alia — ankoraŭ ne estas konata.

La meto de la tero fariĝas ĉe specialaj cirkonstancoj solenaj, ĉeestas multaj geesperantistoj; oni faras fotojn, okazigas paroladojn, plantas florojn k. t. p.


La jugoslaviaj kamaradoj rekomendis:

1. Ke mi informu la bulgaran geesperantistaron pri tiu okazintaĵo.

2. Ke mi postulu de nia CK sendi al Primoŝten (al k-do D-ro Gabriel

Divjanoviĉ — Direktoro de astronomia observatorio en Primoŝten, aŭ al k-do Smerdel Franjo, ambaŭ esperantistoj) flage-ton de Bulgario, kiu estos metita sur nia Bulgara teritorio, kaj semojn de kelkaj bulgaraj floroj — preferinde rozoj, kiuj estos plantitaj en nian bedon.

Mi devas konfesi, ke la tieaj jugoslaviaj geesperantistoj rilatas al la bulgaraj geesperantistoj treege favore, kaj mi estas certa, ke ili prizorgos bone ke nia „Bulgara teritorio“ en Primoŝten estu unu el la plej bonordigitaj bedoj.



La [foto prezentas momenton dum meto de la bulgara tero en la bedon.

D. Denĉev

JUNA ESPERANTISTO

VII-a FESTIVALO DE BULGARA ESPERANTO-JUNALARO

LOVEĈ — 2, 3, 4. IV. 1966

Ĝenerala Klasado

Unua loko — urbo Mihajlovgrad
Dua loko — urbo Ruse
Tria loko — urbo Tolbuhin

Kolektivoj

I. Junularaj Ĥorusoj:

1. Mihajlovgrad
2. V. Târnovo
3. Dimitrovgrad

II. Junpioniraj Ĥorusoj:

1. Varna
2. Loveĉ
3. Nealjuĝita

III. Junularaj Dancensembloj:

1. Mihajlovgrad
2. Jambol
3. Sofia Studenta Societo „V. Peeva“

IV. Junpioniraj Danctrupoj:

1. Tolbuhin
2. Ruse
3. Nealjuĝita

V. Voĉo-estradaĵ Ensembloj (junularaj):

1. Jambol
2. Turista sekcio „Esperanto“ — Sofio
3. Nealjuĝita

VI. Voĉo-estradaĵ Ensembloj (junpioniraj):

1. Tolbuhin
2. Ruse
3. Nealjuĝita

VII. Estradaĵ Ensembloj:

1. Nealjuĝita
2. Vraca
3. Tolbuhin

VIII. Teatraĵ Trupoj (instigaj premioj):

1. Sofia Studenta E-Societo „V. Peeva“
2. Varna
3. Ruse

IX. Belarta Parolado:

1. Speciala premio — v. Timarevo, Ŝumen
2. Speciala premio — Haskovo

Individuaj premiitoj

I. Deklamado (junuloj):

1. Svetlomira Velikova — SSES „V. Peeva“
2. Stefan Dimitrov — SSES „V. Peeva“
3. Hristina Mateeva — Sofio

II. Deklamado (junpioniroj):

1. Nadejda Baĉevska — Pleven
2. Enĉo Bratoev — Ruse
3. Jordan Canev — Ruse

III. Muzikplenumantoj

1. Angel Stefanov — Tolbuhin — (akordiono)
2. Cvetana Atanasova — Trojan — (akordiono)
- Nadja Mineva — Trojan — (akordiono)
3. Juli Nakov — Mihajlovgrad — (violono)

IV. Specialaj premioj:

1. Mariana Popova — Mihajlovgrad



Pârvan Hristov,
Prezidanto de OK



Kolju Panĉev, Vicprezidanto de OK, Respondeculo pri loĝigo kaj nutrado de la festivalanoj



Kiril Kalĉev, Kasisto de OK

por la organizado de la Festivala Ensemblo de urbo Mihajlovgrad.

2. Nikola Nikolov — Sofio — por la rakonto „Ispiranto“.

Festivala Ĵurio:

1. Prezidanto — Atanas Lakov
2. Sekretario — Jordan Angelov
3. Membroj — Kiril Draĵev — literaturo, lingvo
Kiril Kirov — muziko
Maria Stanĉeva — dancoj
Juksel Jusufov — teatro

* * *

Oratora konkurso:

- Unua premio — nealjuĝita
Dua premio — Svetlomira Velikova — SSES „V. Peeva“
Tria premio — Todorka Tonĉeva — Jambol
Zlatka Stoilova — Jambol
Ĵurio: Kunĉo Vălev, Simeon Simeonov — Sofio

Dua Premio — Kiril Petrov — Vraca. Tria Premio — Bojĉo Mladenov — Vraca. Ĵurio: E. Keremidĉiev, P. Todorov, B. Leonov.

Vasil Markov, Respondeculo pri la Ornamo kaj Propagando de la Festivalo

Resume:

premiitaj kolektivoj: 24
premiitaj individue: 12
partoprenintaj grupoj: 19
entute festivalanoj: 1350 el 46 loĝlokoj

D-ro Krum Ivanov, Prezidanto de la financa Komisiono ĉe OK



PLENKUNSIDO DE BEJ EN LOVEĈ

Post la solena fermo de la VII-a Nacia Festivalo de BEJ, la 4-an de aprilo okazis Plenkunsido de la Estraro de BEJ, kiun partoprenis pli ol 30 personoj: gvidantoj de grupoj, membroj de la Ĵurio kaj reprezentantoj de neespartistaj organizaĵoj.

Emil Keremidĉiev, prezidanto de BEJ, malfermis la Kunsidon kaj faris koncizan analizon de la Festivalo.



Solena inaŭguro de la Festivalo per la Reprezenta Urba Ĥoro de Loveĉ

Kiril Kirov, ĥorestro kaj direktoro de la teatro en Loveĉ, diris, ke la Festivalo pasis sukcese. Li kritikis la ĝejnulojn kiuj nesufiĉe siatempe preparis sin por la Festivalo kaj ne ĉiam parolis en Esperanto. Laŭ li la junpioniroj partoprenis tiun grandan E-feston kun videbla deziro por bona prezento. Li laŭdis la artkvalitojn de la junpionira kanthoro el Varna. Oni ne turnis atenton al la kantgrupoj. Li rekomendis BEA liveri repertuaron al la kantgrupoj, eldoni kanton. Li kritikis la estradajn kolektivojn pri iliaj imito kaj strebo al interpreto laŭ maniero de iuj okcidentaj kolektivoj. Laŭ li la estradaj kolektivoj ne montris arton. K-do Kirov kritikis la kolekton de Tolbuhin, ke la muzikistoj eliris sur la scenejo kun neagorditaj instrumentoj. Li proponis ke en la repertuaro de la kolektivoj eniru pli da bulgaraj kantoj. Li rekomendis, ke la E-Festivaloj estu ne Festivaloj de la estrada muziko, sed precipe de la E-kantarto kaj la estradaj kolektivoj estu preparotaj de specialistoj-muzikistoj. K. Kirov laŭdis la partoprenon de la kantgrupo el Jambol. Esencvaj rekomendoj — oni orientigu ne al grandaj kolektivoj, sed al malmultnombraj kantgrupoj, ne forgesante la bulgaran repertuaron.



Antaŭ la Kovrita Ponto

Maria Stoenčeva, specialisto pri dancoj, faris analizon de la danctrupoj: Pri la danctrupo el Tolbuhin ŝi diris, ke la dancantoj bone kaj talente plenumis la bulgarajn popoldancojn kaj tiu kolektivo brile kaj digne povas prezenti Bulgarion en Pécs kaj Budapeŝto. Ŝi laŭdis ankaŭ la junpioniran danctrupon el Ruse, kiu per granda majstreco interpretis malfacilajn kaj belegajn popoldancojn. Si estis kontenta de la sofiaj dancantoj, sed atendis multe pli de ili. Tre kontenta ŝi estis ankaŭ de la kolektivo de Mihajlovgrad speciale pri la originala persona majstreco de ilia gvidanto. La interpretitaj de ili dancoj havis altajn artkvalitojn. La danctrupon el Jambol ŝi tre laŭdis, ĉar ĝi ununura prezentis sin per ĉambrodanco. La danctrupo de Varna plenumis ĉardaŝon kaj ŝi turnis la atenton de la aliaj trupoj al tio.



Antaŭ la Monumento de Hristo Kârpaĉev kaj aliaj pereintaj partizanoj

Juksel Jusufov, reĝisoro de la teatro en Loveĉ, substrekis, ke la plej bona mezurilo de la lingvoscio de la festivalanoj estas ilia partopreno en teatraĵeto kaj arta parolado. Bone prezentis la recitadan arton la studentino el Sofio Svetlomira Velikova, kiu per sia bela Esperanto plej bone propagandis la internacian lingvon kiel vivkapablan lingvon inter la neesperantistoj. La dramgrupoj devas serĉi speci-

fikajn teatraĵetojn. Li proponis ke ĉiusemere oni okazigu kursojn por gvidantoj de teatrotrupoj.

Emil Keremidĉiev faris informon pri la Kongreso en Pécs kaj pri la partopreno de bulgaraj gejunuloj en ĝi.

Jordan Kazakov el Ruse informis pri la preparado de la I-a STELO-Kongreso, okazonta dum aŭgusto en Ruse. Li diris, ke jam estas ricevitaj multe da leteroj, per kiuj la esperantistoj el diversaj landoj sciigas pri sia partopreno.

Bojidar Leonov, vicprezidanto de BEJ, faris informon pri la I-a Internacia Junulara E-Laborbrigado en Veliko Târnovo kaj la partopreno de bulgaraj gejunuloj en ĝi.



Junulara Ĥoro

Bonajn konsilojn kaj rekomendojn pri la estontaj E-Festivaloj faris Vasilka Petrova; ŝi emfazis la rolon de la anoncantoj de la programnumeroj kiel viva ligo inter publiko kaj plenumantoj. Dum la Festivalo en Dimitrovgrad oni turnis preskaŭ nenian atenton al la anoncado de la festivala programo; ĉi-jare ĝi estis anoncata de tri anoncantoj, kiuj variigis kaj interesigis la programon. La diversaj grupoj kaj societoj estonte devas sendi sian detalan programon almenaŭ tri semajnojn antaŭ la Festivalo. Porestonte ŝi proponis ke estu kvar



Kanabina Dancensemblo



Infana Ĥoro el Ruse

anoncantoj: du junulinoj kaj du junuloj.

G. Georgiev parolis pri la intereso de la junuloj el Tolbuĥin al la Internacia Laborbrigado.

Zdv. Velikov el Pleven proponis ke ĉion bonan de la Festivalo oni kolektu, prilaboru kaj disvastigu en la lando. Anticipe en la distriktoj oni faru revuon de la amatoraj artogrupoj. Ŝi faru pli vastan propagandon de la Festivalo en la socio kaj tiucele oni serĉu kunlaboron de la Televido kaj la gazetaro. Li parolis pri la granda eduka signifo de la Laborbrigado kaj pri ĝia utilo por la partoprenantoj, se ili parolos nur en Esperanto.

E. Daskalov el Vraca emfazis, ke la festivalanoj devas esti bonaj esperantistoj. Li kritikis la elekton de „Rozo de la Festivalo“.

Reprezentanto de la urba Komitato de la Partio faris informon pri ĝia helpo por la okazigo de la Festivalo.

A. Kerkin el Varna proponis ke oni anticipe kontrolu la festivalanojn pri la lingvoscio.



Knaba Dancensemblo el Tolbuĥin

D. Ĵdrakov, sekretario de BEJ, respondis al la diskutitaj demandoj kaj faris revuon de la Festivalo laŭ ĝenroj.

P. Ĥristov, reprezentanto de la Urba Komitato de la Komsomolo, rekomendis al la Est-

raro de BEJ doni ĝustatempan helpon al la Festivalo. La gvidantoj de la diversaj grupoj kaj societoj devas helpi la Organizan Komitaton, sendante pli frue la ĝustan ciferon de la partoprenantoj.

Atanas Lakov, Vicprezidanto de BEA, rekomendis ke oni komencu pli fruan preparon kaj donis ĝeneralan bonan pritakson de la Festivalo.

Simeon Simeonov, partopreninto en ĉiuj ĝisnunaj E-Festivaloj de BEJ, faris analizon pri ilia okazigo kaj donis plej altan pritakson de



Mariana Popova el Mihajlovgrad ricevas la premion

la ĉi-jara Festivalo, kiel plej bone organizita ĝis nun. Li emfazis la grandan utilon por la tuta bulgara esperantistaro, se la diversurbaj partoprenintoj respegulos en la loka gazetaro la rezultojn de la Festivalo kaj li rekomendis al ili fari tion.

Emilia Ĵivkova karakterizis vaj pozitive pritaksis la Festivalon kiel grandan manifestigon de la bulgaraj gejunuloj-esperantistoj. Ŝi kritikis la malfruan partoprenon en la preparo de la Festivalo flanke de la Estraro de BEJ. Ŝi dankis al la lokaj esperantistoj kaj neesperantistoj en Loveĉ, kiuj bonege organizis la Festivalon. Ŝi riproĉis la malbonan disciplinon de la partoprenintoj kaj rekomendis ke oni faru anticipe revuojn en la distriktoj. Ŝi kritikis la elekton de „Rozo de la Festivalo“ kiel ofendan rilaton al la virino kaj ke oni devas ĉesigi tiun okcidentan praktikon. La gvidantoj de la grupoj kaj societoj devas almenaŭ 11–20 tagojn antaŭ la Festivalo sendi al BEJ pretajn programojn. Rilate la aliĝadon al UEA Estraro de CK de BEA devas decidi, kiu povas esti membro de UEA. Ŝi klarigis la financon situacion por fariĝi membro de UEA. Ŝi konkludis ke vojaĝo al eksterlando devas esti premio por bona E-agado de la junuloj.

Emil Keremidĉiev ĝeneraligis la eldirojn kaj fermis la Plenkunsidon, bondezirante al ĉiuj gejunuloj ankoraŭ pli brilan sinprezenton en La VIII-a E-Festivalo en Veliko Tŕrnovo.

Nikola Uzunov

KALEJDOSKOPO DE NIAJ KUNLABORANTOJ

FONDIĜIS JUNPIONIRA ESPERANTO-GRUPO EN LA URBO DE LA 22-A IJK

La 3-an de marto fondiĝis Junpionira Esperanto-Grupo kun 32 membroj ĉe la Junpionira Domo en Pécs. Tio estas la unua memstara Junpionira Esperanto-Grupo en la lando. Fest-



Infanoj voĉdonas por la Estraro de la Grupo

parolis S-ino Elizabeta Pallos, sekretariino de la Departementa Esperanto-Komitato.

La infanoj ricevis la membrokarton de Hungara Esperanto-Asocio kaj per ĝi ili voĉdonis por la Estraro de la Grupo: Prezidantino S-ino Elizabeta Koczián, direktorino de la Junpionira Domo, vic-prezidantoj Márta Font kaj Stefano Feld, gelernantoj de la 8-a klaso, sekretario Ladislao Németh, kasisto Tibor Pallos. Estis elektita propagandisto, bibliotekisto, majstro pri kanto, ludo kaj humoro.

En la nomo de la Estraro de Hungara Esperanto-Junularo salutis la Estraron kaj membraron de la unua hungara Junpionira Esperanto-Grupo Béla Gellén, vic-sekretario de HEJ.

La grupo kunvenas ĉiuvendrede en la Domo de la Junpioniroj kaj ludante lernas la lingvon, partoprenas en la junulara Esperanto-vivo de Pécs. Kursgvidantino kaj fondinto de la grupo estas: Ilona Hegedűs. Adreso: Pécs, Szent István tér 17. La membroj atendas la leterojn de samaĝuloj.

Béla Gellén

kunlaboranto de „Juna Esperantisto“

REIPZIG — URBO DE INTERNACIA RENKONTIĜO KAJ KOMERCO

Inter la 6-a kaj 15-a de marto okazis en Leipzig la tradicia printempa foiro. Aligis jam sufiĉe frue 10,000 ekspoziciantoj el 75 ŝtatoj kaj estis 600,000 vizitantoj el 90 landoj. Tiuj nombroj jam montras la mondfamecon de la leipziga foiro kaj la komerca intereso tutmonda.

Dum la foira malfermo parolis la ministro pri komerco de GDR kaj partoprenis ĝin multaj eminentuloj kaj ministroj de aliaj ekspoziciantaj landoj. La nombro de la eksponentaj landoj dum la lastaj tagoj antaŭ la foiro ankaŭ nunjare plialtiĝis kaj la aranĝintoj fakte havis kapdolorojn pro la pretigo de eksponloko por la malfruigintoj.

La esperantistoj en Leipzig uzis la atmosferon por aranĝi dufoje internacian renkontiĝon. Ili okazis la 9-an kaj la 12-an de marto. La unuan kunvenon ĉefe partoprenis germanaj samideanoj kaj oni parolis pri movadaj problemoj. Tamen partoprenis ĝin 4 bulgaraj gastoj kun kiuj oni interŝan-

ĝis opiniojn pri organizado de la movado ktp.

La pli bela kaj impresplena renkontiĝo esperantista okazis la 12-an de marto. Pro tio la leipziga kulturliganoj invitis al ĉarma salono apud la zoologia ĝardeno kaj venis ĉirkaŭ 200 esperantistoj. Estis krome eksterlandaj gastoj kiel jugoslavianoj, hungaroj, poloj, hispano kaj svedo. Inaŭguris la leipziga prezidanto de la esperantista grupo S-ro Bässler. Poste parolis la eksterlandaj gastoj. La polo, kiu rakontis pri la ideo de Esperanto kaj pri la kialo de ĝia ekesto, havis same fortan aplaŭdon kiel la ĉarma hungarino, kiu bonvenigis la ĉeestantojn al la ĉijara Universala Kongreso en Budapeŝto.

Salutis delegitoj de diversaj urboj en GDR — de nordo ĝis sudo. La kunveno finiĝis per privataj interparoloj, personaj konatiĝoj kaj interŝanĝoj de adresoj.

Bernd Weber („Falangio“)

Kunlaboranto de „Juna Esperantisto“

PROFUNDIĜAS LA STUDENTA AMIKECO

Eĥoj de la Seminario de STELO en Torun etendiĝas tra Pollando. Ankoraŭ unu aranĝo de esperantista studentaro, unu ĉenero de persista laboro, kies celo estas unuigi junularon parolantan diverslingve, sen atenti ĝian naciecon kaj haŭtkoloron en komuna batalo por internacia kompreniĝo.

— Por mi, kiu observis la seminarion, ĉiu kunveno, ĉiu diskuto estis viva kaj proksima. Mian urbon — Łódź reprezentis kelkaj gestudentoj, kiuj la seminariaj atingiĝoj pliriĉigis per tre agrablaj kaj utilaj iniciativoj — al nia loka studenta E-klubo ili invitis la Viceprezidanton de Bulgara E-Junularo — Boĵidar Leonov. Ĉu ekzistas pli bona ekzemplo kunigi la agrablan kun la bona?

Vespere, la 19-an de aprilo, la vestiblon de la Lodza Studenta Klubo plenis aro de Esperanto-parolantoj. Krom la klubanoj alvenis aŭskultantoj de E-kurso kaj studentoj neesperantistoj.

La alvenintan gaston tuj ĉirkaŭis rondo de la seminarianoj el Torun. Baldaŭ ĉiuj eksentis sin geamikoj; la personeco de la gasto mem kreis specialan atmosferon, specifan nur por

gaja, amika rondo.

S-ano Leonov alte pritaksis la Torunan aranĝon el ĉiu vidpunkto. Poste ni ekkonis la historion, agaddirektojn kaj plej interesajn aranĝojn de la Sofia E-societo „Vela Peeva“. Imponaj kaj imitindaj estas la iniciativoj de Bulgara E-Junularo. Precipe ekinteresis nin la tradicio de ĉiujaraj Festivaloj de BEJ.

Specialan atenton meritis ankaŭ la internacia Laborbrigado, kiu estas jam ankaŭ tradicio de la junulara movado en Bulgario — ĝi estis detale pridiskutita. Tuj troviĝis volontuloj — estontaj brigadanoj. Nia gasto enskribis agrablajn, amikajn vortojn en la memorlibro. Ankoraŭ sur la strato oni priparolis lastajn problemojn de la renkontiĝo. La gaston akompanis kelkaj personoj. Vere malfacile estis disiĝi. Ni havis tiom da interesaj aferoj por pridiskuti.


La renkontiĝo kun s-ano Boĵidar Leonov estis tre profitodona. Ĝi fratiĝis du societojn: Sofia „Vela Peeva“ kun Lodza „Signal“.

Al tiu ligo mi el tuta koro deziras longan efikan kunlaboron.

Anna Lukaszewska

kunlaboranto de „Juna Esperantisto“

KARA GASTO EN SVEDIO



S-ro Sakaeda kun F-ino Carlsson

S-ro Sakaeda el Japanio faris prelegvojaĝon tra Svedio. Tie li vigle rakontis pri „La lando de la leviĝanta suno“, pri la japana esperantista movado. En kelkaj lokoj oni tradukis liajn interesajn prelegojn al neesperantista publiko. La vojaĝo de s-ro Sakaeda estis bonega propagando por la eblecoj de nia lingvo. Li kaj ĉiuj svedaj junaj geesperantistoj sendas multajn salutojn al la legantoj de „Juna Esperantisto“.

Ingrid Carlsson

Prezidantino de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo

LA JUNAJ ESPERANTISTOJ EN VIL. TIMAREVO

Loveĉ, la urbo de Levski kaj Kârpaĉev, de la siringo kaj la kantoj estas festa, vivoplena. Tie de la 2-a ĝis 4-a aprilo 1966 ĉeestis pli ol 1300 junpioniroj kaj komsomolanoj por partopreni la VII-an nacian junularan E-festivalon. Sur la vasta dronanta en lumoj scenejo estas pioniroj, studentoj, lernantoj k. a. kolektivoj. Oni anoncas la programon. Venas la vico de la junaj geesperantistoj el departemento de Ŝumen. Sur la scenejo eniras 25 ridantaj, vestitaj en diversaj naciaj kostumoj pioniroj. Gaja, ruĝvanga kaj kun verda tuko ĉirkaŭ la kolo pionirino kun klara voĉo ekparolas en Esperanto: „Karaj geamikoj, jam la lingvo de la amikeco kaj la Paco vivas ankaŭ en la nun floranta „Ludogorie“. Antaŭ vi estas grupo de gelernantoj-geesperantistoj ĉe popola elementa



lernejo en vil. Timarevo, departemento de Ŝumen, kiuj plenumos la muntaĵon „Por amikeco kaj paco inter la popoloj“.

Sekvas la kantoj de geknaboj kun klaraj voĉetoj. Ili gloras la pacon, la amikecon kaj la unuecon. La solistinoj Saĝide Mehmedova, Saadet Ahmedova, Telika Seidanmedova kaj Ĝemile Ahmedova estas aplaŭdataj. Pri ilia agado montris intereson la reprezentantoj de CK de DKMS kaj CK de BEA.

Vilaĝo Timarevo, el kie venas la talentaj esperantistoj estas fama per siaj laboremaj agrikulturkooperativanoj, la brustoj al pli ol 40 gekooperativanoj estas ornamitaj per ordenoj pro altaj akiraĵoj en la vilaĝmastruma produktado. La unua esperantisto kaj entuziasma disvastiganto fariĝis la juna instruisto Ismail Halilov. Li organizis E-studrondon. Nur post du monatoj en la nova lernejo aŭdiĝis la vortoj en Esperanto „Saluton, kamarado“.

La entuziasmo de la pioniroj ne restis sen subteno flanke de la pli aĝaj homoj de la socio en la vilaĝo. Adepto de Esperanto fariĝis ankaŭ la Direktoro de la lernejo k-do P. Aliev. Ili ricevis subtenon ankaŭ de la popola konsilantaro en Hitrino, de la fako „Popola klerigo“ en Ŝumen. En la preparo por la festivalo plej multe helpis ilin la instruistino pri muziko Sneja Caninska. La agrikultura laborkooperativo per sia propra aŭtobuso veturigis ilin al Loveĉ, kie ili ricevis festivalan premion.

La studrondo havis ankaŭ alian manifestiĝon — ili partoprenis kun sia E-programo la solenan malfermon okaze de la celebrado de 60-jara jubileo de E-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen. Ili lernas diligente ankaŭ la aliajn siajn lernobjektojn.

Cvjatko Todorov
Ŝumen

ДО ЦК НА БЕС СОФИЯ

Por kompletigi ĉiujn ĝis nun aperintajn jar-kolektojn de „Bulgara Esperantisto“ en la muzea kolekto, la gesamideanoj estas petataj sendi aŭ interŝanĝi la jenajn ekzemplerojn:

- J. I. — 1919/20 — n-ro 1, 5, 6.
- J. VIII — 1926/27 — No 7, 8, 10.
- J. IX — 1927/28 — No 10.
- J. XI — 1929/30 — No 4, 5, 6, 9, 10.
- J. XII — 1930/31 — No 1, 2, 3, 7, 8, 9, 10.
- J. XIII — 1931/32 — No 1.
- J. XIX — 1932/33 — No 1, 2, 3, 4, 7, 8, 9, 10.
- J. XV — 1933/34 — Ĉiuj numeroj.
- J. XVI — 1934/35 — No 5—6, 9—10.
- J. XXIII — 1942 — No 5—6, 7—8, 9—10.

Adreso: D-ro B. Nedkov, Sofio,
Bulv. D. Blagoev 35


Представители на есперантистите от крайдунавските градове, събрани на другарска среща на 30 април и 1 май т. г. в историческия град Видин за обмяна на опит, Ви изпращат сърдечни есперантски поздрави.

Обменяйки опит във връзка със стила и методите на работа, ние обещаваме още по-усърдно да работим за масовото изучаване и разпространяване на международния език есперанто, език на мира, разбирателството и дружбата между всички народи в света.

ORGANIZA VIVU

BURGAS. La 22-an de aprilo la societo „Nigra Maro“ okazigis sian jaran kunvenon.

Post la tralego de la raporto pri la agado de la societo okazis diskutoj.



E-kurso ĉe Ekonomia Mezlernejo en Burgas, kursgvidanto M. Janev Georgiev

Oni elektis novan estraron: prezidanto — Argir Andonov, vicprezidanto — Mihail Janev, sekretario — Kostadin Limonov kaj aliaj.

JAMBOL. La 28-an de aprilo 1966 E-societo „Maksim Gorkij“ organizis kunvenon okaze de la 90-jara datreveno de la Aprila Ribelo. Parolis k-do Stefan Kâlcišov, gimnazia instruisto-historiisto kaj bona esperantisto. Ĉiuj aŭskultis kun granda atento la informojn pri la aprila ribelo en Jambol kaj en la distrikto de Jambol.

Marija Kaculeva

Ni ankoraŭfoje montris, ke la esperantistoj estas nedisigebla parto de nia popolo. Kune kun la aliaj organizaĵoj ankaŭ ni manifestaciis



la unuan de majo. Kune kun la aliaj homoj ni marŝis sur la ĉefa strato „Rakovski“, preter la tilioj trapasis la placon „Liberiĝo“...

Kiam la kolono de la esperantistoj marŝis antaŭ la tribuno la oficialaj personoj aplaudis kaj kriis „Vivu Esperanto!“ En la sama tempo la laŭtparoliloj de la urba radioservo anoncis: „La esperantistoj de Jambol estas batalantoj por la paco“.

La 7-an de majo 1966 en la domo de la juna esperantisto Dinju Radev Stojanov okazis bela festo. La junulo festis sian dudektrian naskiĝtagon. En lian domon venis multaj gejunuloj — Tanja Alekova, Radka Beneva, Mima Kalâpova, Ekaterina Kamburova kaj aliaj. Je la nomo de E-societo Ek. Kamburova gratulis k-don D. Radev kaj deziris al li fruktodonan E-agadon. Ŝi transdonis al li donacon de la societa estraro.

Mima Kalâpova

UNUAMAJA MANIFESTACIO EN KAZANLÂK

Frumatene la pluvo subite ĉesis, la vento forpelis la nubojn al la montaroj kaj la sunradioj kisis denove la vastaĵojn de la Valo de la Rozoj. La loĝantaro de Kazanlâk triumfis. Triumfis ankaŭ la esperantistoj. En la ĝardeno de la Kultura Domo „Iskra“ oni aŭskultis ĝojajn interparolojn. Tie ĉi kolektiĝis junaj kaj maljunaj esperantistoj. La junpioniroj estis pli ol sesdek, poste sekvis la gejunuloj el la teknika mezlernejo „Generalo Cvjatko Radojnov“, anoj de E-societo „Roza Valo“, ĝia estraro kaj simpatiantoj. La tuta grupo estis pli ol 150 gesamideanoj, kiuj partoprenis en la manifestacio. Ĉiuj kantis la popularan kanton „Druĝna pesen“. Pasante antaŭ la estrado, kie troviĝis Herooj de la laboro, partizanoj kaj gvidantoj de la urbo ni ĝoje skandis la sloganojn: Vivu la paco!... Vivu Esperanto! Sur la estrado troviĝis ankaŭ nia kara amiko — la esperantisto, filo de nia E-societo Ĥristo Kelĉev, prezidanto de la Distrikta Konsilantaro en Stara Zagora. Li forte aplaudis kaj kune kun li ĉiuj ĉeestantoj. La momento estis neordinare sublima kaj ni faris bonan propagandon por Esperanto.

Vivu la Unua de Majo! Vivu la paco! Vivu Esperanto!

Ivan Zahariev

STARA ZAGORA. La 6-an de februaro E-societo „Verda srela“ okazigis la jarkunvenon.

La prezidanto faris raporton pri la sukcesoj kaj malsukcesoj de la societa agado. Post la raporto estis diskutoj kaj proponoj por la estonta laboro. Oni elektis novan estraron.

UNUA INTERNACIA KONGRESO KONEKSE KUN LA ESPLORADO DE SUDORIENTA EŬROPO

(BALKANISTIKO)

de Akademiano Vladimir Georgiev

La ekzisto de multenombraj komunaj trajtoj en la evoluado de la balkanlandaj popoloj estas bone konata fakto. La esplorado de tiuj komunaj trajtoj el vidpunkto de la historio, arkeologio, etnografio, lingvistiko, folkloroscienco, literaturo, arto ktp., prezentas specialan intereson por la scienco ĝenerale kaj precipe por la scienco pri la vivo de la popoloj, loĝantaj sur la Balkana Duoninsulo. Kaj ĝuste tio estas la objekto de studado fare de la balkanistiko, kiel scienco.

Kaj ĉu povus ekzisti io pli utila, pli valora ol tiaspeca scienco, kiu okupas sin pri studado de la komunaj faktoroj, kiuj interproksimigas la popolojn? Efektive, la balkanistiko estas ĝuste tia scienco, povanta kontribui por la reciproka konatiĝo kaj ploksumiĝo de la popoloj.

En la somero de 1962, laŭ iniciato de rumanaj specialistoj pri la balkanistiko kaj per la kunhelpo de UNESKO, en urbo Sinaja (Rumanio) estis kunvokita Internacia Kolokvo, konekse kun la problemoj pri la balkanlandaj kulturoj. Dum la kunsidoj de tiu kolokvo kiun partoprenis specialistoj el ĉiuj landoj de la Balkanoj, kaj ankaŭ sciencistoj el USSR, Francio, Anglio, Italio k. a., oni decidis, ke devas esti kreita Internacia Asocio por scienca esplorado de Sudorienta Eŭropo, t. e. — Asocio pri Balkanistiko.

Tiu Asocio havas kiel celon trastudi ĉion komunan en la vivo de la popoloj sur la Balkanoj. La kreo de tiu Asocio estas feliĉa evento, havanta plej altgradan signifon ne nur por la scienco. La scienca esplorado kaj la reliefigo de ĉiuj faktoroj, kiuj interproksimigas niajn popolojn, prezentas

valoran kontribuon por la sciencaj esploristoj, konekse kun ilia laboro, ĉelanta pli vastan interkomprenon kaj reciprokan konatiĝon de la balkanlandaj popoloj. Tiamaniere, la kreita Asocio kontribuas por la kreo de paca atmosfero en la interrilatoj de niaj balkanlandaj popoloj.

De la 26-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro ĉijare, en Sofia okazos la Unua Internacia Kongreso pri Balkanistiko. Dum tiu Kongreso oni diskutos problemojn el la sferoj de la historio, la arkeologio, la etnografio de la balkanlandaj popoloj, kaj ankaŭ la problemojn pri ties lingvoj, literaturoj kaj artoj. La intereso pri tiu Kongreso estas eksterordinare granda. Pri ĝi atestas la fakto, ke ĝis nun esprimis deziron partopreni ĉirkaŭ 1000 delegitoj el 25 landoj. Estos reprezentitaj per imponaj delegitaroj: Albanio — 39, Bulgario — 180, Greklando — 81, Rumanio — 144, Turkio — 24, Jugoslavio — 173. Per konsiderindaj delegitaroj estos reprezentitaj ankaŭ kelkaj aliaj landoj: Aŭstrio — 13, Britlando — 11, GDR — 43, Pollando — 32, USSR — 84, USA — 65, Hungario — 56, Francio — 20, Ĉeĥoslovakio — 52 k. a.

Dum la Kongreso estos prezentitaj ĉirkaŭ 450 raportoj, distribuitaj en 11 sekciojn. Ĉiuj raportoj estos antaŭe presitaj — la fundamentaj entute, la sekciaj — en pli aŭ malpli longaj epitomoj.

Ĉe la plenkunsidoj oni prezentos jenajn raportojn fare de kolektivoj el plej eminentaj specialistoj:

1) La popoloj en Sudorienta Eŭropo kaj ilia rolo en la historio.

2) La evoluado de la literaturoj de la popoloj en Sudorienta Eŭropo, konek-

se kun la literaturoj de la ceteraj nacioj.

3. Komuneco kaj diferencoj en la arto de la balkanaj landoj de la XVI-a ĝis la XVIII-a jarcentoj.

4. Fundamentaj problemoj de la balkanlanda lingvistiko.

Oni atendas, ke pri la menciitaj raportoj okazos animitaj debatoj.

Por la delegitoj de la Kongreso es-

tas projektitaj diversaj sciencaj ekskursoj al iuj lokoj en nia lando, kiuj havas historian signifon.

La grandega intereso pri tiu Kongreso ne povas ne ĝojigi nin. Tamen, samtempe ĝi devigas la bulgarajn specialistojn pri la Balkanistiko ekde nun klopodi ankoraŭ pli serioze, por organizi ĝin modele en scienca kaj teknika rilatoj.

СЪОБЩЕНИЯ ОТ БЮРОТО НА ЦК НА БЕС

I. В резултат на обявения конкурс за написване на есперантски учебници и помагала („Булгара есперантисто“ — бр. 7-8/1964 г.) постъпиха следните проекти:

1. Есперантски учебници:

а) учебник по есперанто за най-малките и учебник по есперанто за малките (от IV до VII кл.) от Дамян М. Крушев, Никола Т. Петков и Славчо Ст. Шияков от Толбухин.

б) Учебник по есперанто от Йорданка М. Козачева от София.

в) Моят пръв учебник по есперанто от Недялко Бояджиев от Пловдив.

г) Есперанто за пионери от Иван Захариев от Казанлък.

д) Учебник по есперанто от Зора Младенова Ханс и Георги Хр. Димов от Варна.

2. Помагала:

Есперантска христоматия от Симеон М. Симеонов от София.

Проектите бяха рецензирани и Бюро-то одобри препоръките на комисията за преработка на проектите. За целта на авторите се даде 6-месечен срок да ги представят преработени. Този срок изтича през сеп-

тември 1966 г. След това проектите ще бъдат дадени на редакционна обработка и за отпечатване.

II. Бюро-то в заседанието си на 8. IV. 1966 г. реши Пленумът, насрочен за 9. V. 1966 г., да преработне в национална конференция, като на всеки 50 члена или част от 50 члена се избира един делегат. Пътните разходи са за сметка на местните дружества.

Конференцията се свиква за 20 юни. На 19 юни туристическата секция да уреди за делегатите тържество на Витоша.

Ще бъдат изнесени следните доклади:

1. Състояние и задачи на Българския есперантски съюз — докладва Н. Алексиев.

2. Същност и задачи на младежките есперантски фестивали — докладва Сим. Симеонов.

За по-подробно разясняване на проблемите, свързани с конференцията, ще се изпрати до дружествата нарочно окръжно.

De la 8-a ĝis la 12-a de junio 1966 en Uberlandia, Minas Gerais, okazos la Unua Brazila Kongreso de studantoj de Esperanto. Niajn gratulojn kaj bondezirojn.


Karaj gekamaradoj,
Belarusia Esperantista Unuiĝo salutas vin kaj sendas siajn bondezirojn okaze de la Internacia 1-maja festo!

Ni esperas, ke venos baldaŭ la tempo, kiam ĉiuj embarasoj sur la vojo de Esperanto-movado malaperos, kaj nia Internacia Lingvo estos akceptita en ĉiuj landoj kiel sola helpalingvo de internaciaj interrilatoj.

Sed tio dependas de ni.

Do, ni laboru, laboru kaj laboru!

Sekvas subskriboj de 14 esperantistoj el Minsk.



NI MANIFESTACIIS

La internacian Tagon de la Laboro ni festis solene. Ni, pli ol cent gelernantoj, gejunuloj kaj pli aĝaj geesperantistoj per afiŝoj kaj flagoj manifestaciis nian unuecon kaj pretecon batali por konservi la tutmondan pacon. Kiam niaj esperantistaj vicoj pasis preter la centra tribuno la oficialaj personoj salutis



vigle nin, kaj ni kun granda ĝojo skandis „Vivu la Unua de Majo! Vivu la paco! Vivu Esperanto“!

Nian partoprenon en la Unuamaja manifestacio kaj niajn sloganojn la parolinto menciis kaj ripetis per laŭparolilo. Tiamaniere niaj esperantistaj societoj denove pruvis, ke ni estas bone organizitaj kaj ke niaj anoj aktive batalas por la paco.

Jeko Zaprjanov

sekretario de la Esperantista
Urba Komitato-Dimitrovgrad

SVIŠTOV. La 1-an de majo — la internacian tagon de la laborista solidareco ni festis plej solene. La stu-



dentoj, membroj de la studenta esperantista societo „Aleko“ ĉe la Supera Financa Ekonomia Instituto marŝis kun la slogano „Per Esperanto ni batalu por mondpaco!“

Cočo Kolarov

NE HEZITU, TUJ DECIDU!

Ek de ĉi-jare E-societo „Radio“ (Bulgario, Pazarĝik, str. Lenin 33) havas je sia dispono koketan vilaon. Ĝi estas je ne pli ol unuhora veturo per aŭto, for de la urbo, meze de Rodopi-montaro, nur je kelkaj kilometroj de la historia urbo Batak kaj je cent metroj apud la baraĵlago „Batak“. El Pazarĝik veturas al tiu direkto regula aŭtobuso, kvarfoje ĉiutage. En la restadeja komplekso estas legomvendejo kaj vendejo por diversaj aliaj produktoj, restoracio.

Proksime estas belegaj turistaj objektoj por dumtagaj ekskursoj kaj sufiĉe da boatoj por promenado sur la lago. Vintre proksime estas ebla skiado.

La vilao apartenas al nia membro-kuracisto Vladimir Bojaĝiev, kiu ĝin donis je dispono de la E-societo. Ek de la unua de julio ĉi-jare la societo povas akcepti alilandajn gastojn je interŝanĝa principo. La vilao konsistas el kvar ĉambroj, do, kelkaj unuopuloj aŭ du geedzaj

paroj povas restadi en ĝi samtempe. La somerumantoj en la vilao sin devigas garantii reciprokan akcepton de niaj societanoj prezentitaj al ili de la societa estraro. Pri pli detala pritrakto vi adresu vin al ni, laŭ la supra adreso. Al la interesiĝantoj ni sendos ankaŭ fotojn.

Ni helpas niajn gastojn ankaŭ viziti aliajn lokojn en la lando. Ĉe la reciproka akcepto ni ne postulos nepre samajn kondiĉojn. Do, al ni trankvile povas sin adresi ankaŭ esperantistoj kun pli modestaj eblecoj.

Esperantistoj el la tuta mondo, ne preterlasu la okazon somerumi je plej favoraj kondiĉoj por vi en la lando de la rozoj. Post vizito de niaj nigramaraj restadejoj kaj strandoj nenio estas pli efika kaj konvena antaŭ la reveno ol almenaŭ kelktaga ripozo meze de la pitoreska Rodopi-montaro. Do venu gaste al ni.

Petko Arnaudov

DEK ORDONOJ AL LA LERNANTARO

1. Amu viajn lerneajn amikojn, kiuj estos viaj Amikoj en laboro dum via tuta vivo.

2. Amu la scion, kiu estas la pano por via prudento; estu dankema al via instruisto, kiel al viaj patro kaj patrino.

3. Glorigu ĉiun tagon de via vivo per bona faro, per amika ago.

4. Respektu la honestajn homojn, estimu ĉiun, sed ne klinu vian kapon antaŭ iu ajn.

5. Ne malamu, ofendu neniun kaj ne venĝu al iu ajn, sed ĉiam defendu vian rajton kaj ne submetiĝu al la arbitro.

6. Ne estu hipokrita, estu ĉiam amiko al la malfortaj kaj amu la justecon.

7. Ne forgesu iam ajn, ke ĉiuj teraj bonoj estas produkto de la laboro kaj tiu kiu senla-

borante vivas feliĉe, ŝtelas la panon de la laboristo.

8. Observu kaj pripensu, por ke vi trovu la veron. Ne kredu tion, kio estas kontraŭa al via prudento kaj mensogu nek vin, nek la aliajn.

9. Ne kredu, ke amas sian patrolandon tiu, kiu malamas kaj malestimas la aliajn popolojn, aŭ volas militon, kio estas restaĵo de la barbareco.

10. Volu, kontraŭe, ke venu la tago, kiam ĉiuj homoj estos liberaj civitanoj kaj vivos kiel fratoj en paco kaj justo.

El „Internacia Socia Revuo“

N-ro 6, jaro 1910

Esperantigis: Penko Petrov

Mi deziras respondi kaj ŝanĝi spektan kun vi en la pedagogia laboro. Mi instruas E-tan en 8 kursoj. Scribu al mi!

Via: [Signature]

ŜTATA KOMBINUMO POR PRILABORADO DE VIANDO

VARNA

PRODUKTAS:

14. XI. 1966

S-ano ENJO BASKALOV
INSTRUISTO


diversajn specojn de viando, kolbasojn, objektojn el kornoj kaj ostoj, albuminfarunon por nutrado de kreskantaj porkidoj.

Redakta komitato: Kiril DRAJEV, Dimitr JDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 3-26-82

Prof. Syonch.

ŜTATA METALURGIA UZINO „PÂRVI MAJ“ — UREO POLSKI TRÂMBEȘ



FABRIKAS

JENAJN KAMPARMASTRUMAJN MAŜINOJIN:

1. Transportilo por stala sterko tipo — VP-100, 150 kaj 200 m kaj VPN — 9,2 kompleto.
2. Transportilo funkciigata per puŝ-stangoj
3. Laktosuĉigilo por bovidoj kun varmig-aparato (XMT-24).
4. Tranĉmaŝino por beto (CV—250).
5. Kovrilhavaj trinkigujoj por brutoj.
6. Furaĝ-brogilo.
7. Ĉareto por furaĝo kaj ovoj.
8. Pumpiloj kun rotaciantaj piŝtoj.
9. Buldoz-ŝovelilo al traktoro DT-20.
10. Inercie vibranta mangotrogo por kortobirdoj.
11. Mangotrogo por kombinitaj furaĝoj.



DECHATHO
PRESAJO